# ILEI

ILEI havas 34 sekciojn
Dum la lasta Komitatkunsido ni aprobis unu novan sekcion el Ganao kun la sekciestro Alfred Kobina Arthur.
ILEI havas 18 reprezentantojn el 18 landoj.
ILEI havas kun la nova sekcio, 509 membrojn
Ĉiu jare la sekcioj sendas jarraportojn al ILEI estraro.
Por 2022 la jarraportojn sendis landoj:
Belgio,Brazilo,Burundo,Danio,Francio,Germanio, Hungario, Indonezio, Irano, Italio, Japanio, Kroatio KEL, Kroatio KEU, Mongolio, Rumanio, Senegalo, Serbio, Svedio, Svislando, Tanzanio, Togolando, Ukrainio, Britio, Portugalio, kaj Zimbabvo.
Ĉiu lando havas malsamajn eblecojn, problemojn kaj ideojn, sed la raportoj estis tre interesaj.

La mallonga resumo de la raportoj:
ILEI-sekcio en Belgio havas 16 membrojn, du komitatanojn. La prezidanto estas Marc Cuffez. Kristin Tytgat donis kursojn enlande kaj eksterlande.

Brazila ILEI-sekcio havas 6 membrojn, 2 komitatanojn. La sekciestro estas Aristophio Andrade Alves Filho. Ili havas retejon, paĝaron en fejsbuko, oficialan ret-adreson. Ili organizis virtualajn kursojn A1/A2 kaj B1. La sekcio aperis je la 24-a Nordorienta Esperanto-Renkontiĝo kaj Junulara Renkontiĝo de Nordoriento kiel kunordiganto, kaj partoprenis je la virtuala Esperanto-instruista Renkontiĝo de Sudameriko. Aristofio prelegis en la 3-a VEKI. Informo estas pri Lernejo Zamenhof, instruistino Amelia B. Paĉeco komencis kurson per la kanalo TV Supren.
Virtualaj kursoj: Programo:Mia Amiko, kurso laŭ metodo Friis. Kursoj en Asocioj: Kultura kooperativo de Esperanto, Esperanta Ambasadejo.

Britujo ne havas sekciojn. La landa reprezentanto estas Renato Corsetti kun du membroj. Ili havas oficialan hejmpaĝon kaj ret-adreson: renato@esperanto.org Ili organizis 3 retajn kunvenojn de la instruistoj en la kursoj de la Londona Kursaro, kaj retajn kursojn por niveloj de A1 al B2 de la Londona Kursaro kunlabore kun la Londona esperanto -klubo.

Burunda ILEI-sekcio havas 11 membrojn, unu komitaton. La prezidanto estas Gilbert Ndihokubwayo. Dum la jaro 2022 ili daŭrigis la instruadon

de Esperanto en 17 kluboj. Ili starigis instruadon de la internacia lingvo ankaŭ en infanĝardeno „Espero”.

Dana ILEI-sekcio havas 13 membrojn, unu komitatanon. La sekciestro estas Pia Weterrgren. Ŝi rete instruas komencantojn kaj strebas trovi novajn gelernantojn. Ŝi havas kontaktojn kun Kamerunio.

ILEI Francio havas 34 membrojn, 17 retajn,17 paperajn, du komitatanojn. La sekretario kaj sekciestro estas Didier Janot. ILEI Francio bone funkcias: instrua agado okazas en lokaj kluboj, en lernejoj kaj universitatoj. Ili havas dulingvan retpaĝon ĉe Eventa Servo por prezenti la asocion al francaj esperantistoj kaj al neesperantistaj instruistoj aŭ interesiĝantoj.

Ganao kreis novan ILEI-sekcion kun 6 membroj. La sekciestro estas Alfred Kobina Arthur. Ili havas grandajn planojn: enkonduki Esperanton en lernejojn ne kiel studobjekton sed kiel klubojn

Germanio havas 55 membrojn, 45 paperajn, 7 retajn. La prezidanto estas Zsofia Korody, rajtigitaj komitatanojn 4.Landa sekcio de ILEI, mallongigo AGEI estis fondita en 1968, havas oficialan hejmpaĝon kaj re-adreson. AGEI tradicie havas sian jarkunvenon dum la Germana Esperanto-Kongreso GEK. La AGEI kunsido estas publika. Reprezentantoj de Interkultura Centro Herzberg, informis pri instruado de Esperanto per modernaj metodoj. La sepan fojon estis organizita somera intensa Esperanto-Kursaro; Semajnoj de Esperanto-Perfektigo. La programon riĉigis kulturaj kaj muzikaj eventoj, kantado, rakontado, prelegoj kaj prezentadoj. Ankaŭ en 2022 kunvenis la reprezentantoj de landaj ligoj kaj fakaj asocioj de Germana Esperanto-Asocio GEA. AGEI kaj Interkultura a Centro-Herzberg kunlaboras kun Landa Plenkreskula Kleriginstitucio. AGEI subtenas la projekton „1 leciono pri Esperanto”. La materialo estas havebla en pluraj lingvoj.
En 2022 ili alvokis gekolegojn utiligi programkajerojn de Popolaltlernejoj kiuj atingis vastan publikon. AGEI novaĵoj aperadas en la gazeto de GEA *Esperanto aktuell* kaj AGEI regule kunlaboras pere de siaj instruistoj kun popolaltlernejoj. Kursoj kaj klerigcelaj kunvenoj okazadas en pluraj federaciaj landoj, urboj ekz. en Hamburgo, Frankfurto, Stuttgardo , Berlino, Hamelno, Neubrandenburgo.

AGEI kunagas kun Germana Esperanto-Centro por la ordigado, pliriĉigo de la Biblioteko en Herzberg am Harz kie okazas tutjara programo, multaj kunvenoj, kursoj kaj klerigseminarioj, la biblioteko servas publikan intereson.

Hungara ILEI-sekcio, ILEI-HU, havas 35 membrojn, tri rajtigitajn komitatanojn. Prezidanto estas József Németh, la ĉefredaktoro de IPR. Ili havas oficialan hejmpaĝon kaj ret-adreson. Ili havas ankaŭ retgrupojn. Por ILEI-celoj laboris Katalin Kováts, Stefan MacGill, Judit Felszeghy, Mónika Molnár, Anjo Amika, Salomon Csiszár Pálma, József Németh, Lajos Molnár. Ili organizis ekzamenojn, asembleon, redaktis IPR-on kaj *Junan Amikon* kaj zorgis pri retejoj.

ILEI sekcio de Indonezio havas 5 membrojn, 1 rajtigitan komitatanon.Ili havas oficialan ret-adreson.La prezidanto estas Ilia Dewi. La sekcio kunlaborante kun Indonezia Esperanto-Asocio organizis bazan kurson rete kun loka klubo de Esperanto. Kunlaborante kun IEA aranĝis enkondukan kurson rete en loka komunumo.

Irana Ligo de Esperantistaj Instruistoj (IrLei) havas 6 membrojn, unu rajtigitan komitaton. La sekciestro estas Ahmad Reza Mamduhi.Ili havas oficialan hejmpaĝon, ret-adreson kaj retgrupon.Agado: ekde la 18-a de oktobro 2022 ĝis la 10-a de decembro ili trovis okazon preskaŭ ĉiutage prezenti kaj instrueti Esperanton dum sep semajnoj en relative granda ŝtata mezlernejo nomata Ŝahid Bageri en pli ol 10 diversaj klasoj. Sekve de tio la direktoro de la lernejo, s-ro Mohreĉi prezentis ilin al respondulino en la Distrikta Urbodomo, kie ekde la 4-a de decembro dum pli ol tri monatoj ili havas ĉeestan Esp-klason por plenkreskuloj. Sabate okazas konversacia ekskurso en parko ĉe la Kvartal-domo, dimanĉe okazas la lecionoj laŭ la libro *Rekta Metodo*. Marde okazas konversacia kurso kaj ĵaŭde konversacio virtuale per ZOOM.
En 2022 okazis retaj Esperantaj kursoj en la Universitato Mazandarano: elementaj kaj mezgradaj kursoj.
Sekve de retseminarioj pri Esperanto kaj Turismo en la Universitato de Tehrano en dec. 2021 kaj jan. feb. 2022 okazis du kursoj: unu ĉeesta kiun gvidis Hamzeh Shafiee kaj unu reta kiun gvidis Ahmad Mamduhi.
Nova reta Esperanto-kurso 2 foje semajne okazas por lernantoj kaj praktikantoj de jumejho laŭ la Rekta metodo. Sekve de la kurso okazos la ĉeesta parto de la 10-a Irana Esperanto-Kongreso.

Itala sekcio de ILEI havas 30 membrojn, 2 rajtigitajn komitatanojn. Ili havas oficialan hejmpaĝon kaj ret-adreson. Sekciestro estas Luigia Oberrauch. Kiel propraj agadoj estas instruado de Esperanto pere de ĉeestaj kursoj kaj retkursoj en multaj urboj : Parma, Bologna, Genova, Torino, Padova, Trieste, Alto garda, Trento, Pisa, Grosseto, Pescara, Verdello kaj Roma. Aranĝoj kun aliaj kie la sekcio aperis estas „30 oraj horoj" kun Itala Instituto de Esperanto, projekto por superaj lernejoj, kaj la projekto de reta instruado pere de la lernolibro de Pedro Aguilar fare de Itala Esperanto-Federacio. La sekcio kunlaboris kun UEA; IFEF; BEMI kaj aliaj por la projekto „KA 2 VERDEN" kaj kun Kolektivo Bernardoni por la traduko kaj eldono de la libro *La ĉiutaga vivo kiel historio sen timoj kaj sen psikiatrio*. La sekcio havas kontaktojn kun la fervojistoj kaj eŭropaj federalistoj. Oni okazigas kursojn en Torino, Biella, Vercelli, Bergano, Mantova, Genova, Trento, Alto Garda. Vicenza, Padova, Bologna, Parma, Firenze, Grosseto, Pisa, Roma kaj Gottaferrata. Membro de la sekcio, Alessandra Madella, instruis Esperanton al la gestudentoj de Zaozhuang-universitato. Kun Maximiliano Garcia, la sekcio iniciatis sukcesajn video-projektojn kiel „La Granda Homa Ĉeno" de ILEI kaj MA-GA Filmoj.

Japana Sekcio de ILEI havas 20 membrojn kaj unu rajtigitan komitatanon. Sekciestro estas Isikawa Tieko. Ili havas oficialan ret-adreson Ili organizis paroligan kurson „Ni parolu" por doni al japanaj komencantoj la okazon alkutimiĝi al interparolo en Esperanto.Varbado okazis dum Japana Esperanto-Instituto pere de *La Revuo Orienta*. Okazis kursoj de Esperanto en tri universitatoj.

Pedagogia sekcio de KEU: ILEI KEU havas 6 membrojn, unu rajtigitan komitatanon. Sekciestro estas Svijetlana Akik. Propraj aranĝoj estas seminario: Manlibro pri instruado de Esperanto, perfektiga kurso per ZOOM kaj paroliga kurso per ZOOM. Sekcio aperis ĉe VEKI 3, virtuala Esperanto-Kongreso, AMO 94 kolektado kaj arkivado de esperantaĵoj, 8-a Memorialo Lucija Borčić kaj AMO 95, Zamenhoftago. En 2022 organizis ekprilaboro de apo. Kunlaboras kun edukado.net. Aktiva agado rilate la proponon de la honora membro de ILEI, subteno de deko da ILEI sekcioj.

Kroata ILEI-sekcio nomiĝas Unuiĝo de prelegantoj de Esperanto UPE havas 6 membrojn, du komitatanojn. Ĝi havas oficialan ret-adreson.

Propraj aranĝoj en 2022 estas E-kursoj, prelegoj,ekspozicioj pri Esperanto en la urbaj bibliotekoj kaj eldonado de E-libroj. La sekcio kunlaboris kun la projekto Tago de la urbo Bjelovar. Ĝi havas kontaktojn kun urbaj bibliotekoj, kun societo Krugovi kiu helpas malriĉajn infanojn. Ili gvidas kursojn en la societo „Poligloto"kaj la membro de la sekcio instruas Esperanton en la elementa lernejo P. Miškine. La sekcio kunlaboras kun la landaj sekcioj kaj sekcioj eksterlanden: membro Roberto kunlaboras kun esperantistoj el la najbara Slovenio, kune kun P. Grbec gvidas 20-horan retan kurson. Dokumenta Esperanto-Centro eldonas E-librojn. Enkadre de „Urbaj tagoj"en Bjelovar la sekcio organizas Esperantajn tagojn kiuj iĝis internaciaj.

Mongola ligo de Esperantaj Instruistoj MLEI havas 5 membrojn, unu komitatanon. Kun Mongola Esperanto Societo ili havas 2 Fejsbuko-paĝojn. Sekciestro estas KhorlooTserendejid. La grava elementa kurso okaziĝas en fejsbuko: „Ĉu vi volas lerni Esperanton". Tie la sekcio ne okazigas nur E-kurson, sed ankaŭ enigas informojn pri Esperantaj eventoj en la lando kaj ekster. Ili partoprenis kelkajn virtualajn aranĝojn: VEKI 3, Virtualan kongreson de UEA, la 10-an kongreson de KAOEM kaj IKEF.

Portugala Esperanto agado por 2022: la reprezentanto estis Luna M. Silva kiu sendis informon, ke okazis en Portugalujo unu baznivela kurso kiun gvidis Alexandra Paz kaj Roger Prieto. Per *Rekta Metodo* de Stano Marček.

Rumana ILEI-Sekcio havas 16 membrojn kaj 2 rajtigitajn komitatanojn. Ili havas oficialan ret-adreson. La sekciestro estas Mihai Trifoi. La sekcio organizis, kunlabore kun la membroj de la Esperanto- Asocio de Rumanio la nacian renkontiĝon kaj la EAR- Kongreson en la urbo Gherla. Inter la programeroj de la Nacia Renkontiĝo estis kelkaj gravaj: Ekspozicio de esperantaĵoj, interkona vespero, projekto Granda homa ĉeno, elekto de la nova Estraro de EAR, prezentado pri la partopreno en la 107-a Universala Kongreso, libroprezento, Internacia Tago de Paco. Dum la lasta tago de Kongreso okazis Simpozio de Esperanto. Ili organizis E-kursojn en Timisoaro, kaj en la urbo Suceava.. Dum la 107.-a UK Aurora Bute estis elektita en la Estraro de UEA. La sekcio aperis ĉe la 73-a IFEF-Kongreso, Universala Kongreso de Esperanto, Kongreso de la E-Asocio de Rumanio, retaj renkontiĝoj organizitaj de UEA kaj ILEI.

Aliaj projektoj estas : publikigi Rumanan-Esperanto-Vortaron, publikigi artkolojn pri Esperanto, prelegi pri Esperanto al neesperantistoj, organizi ekspozicion pri esperantaĵoj. Kutime la sekciestro partoprenas kunvenojn de intelektuloj kaj gravuloj kadre de la Eŭropa Studcentro Covasna – Harghita.

Senegala ILEI- Sekcio havas 6 membrojn, unu komitatano.La prezidanto estas Lafi Charles DIATTA
Senegalo ĝuis riĉan jaron 2023 pri Esperanto dank' al kunlaboro de ILEI kaj de Mireille Grosjean. En 2022 estis kursoj dum rentontiĝoj de la landa asocio. Kadre de preparo de la 8-a AKE en Senegalo okazis duhoraj kursoj. Sinjoro Vjacheslav Ivanov de Rusio estia kurshvidanto de oktobro ĝis decembro. En Dakaro kursoj estas gvidataj de Lafi Charles Diatta. Aliaj kursgvidantoj estas Assane Faye, la prezidanto de landa asocio, kaj Ismaila Idione, estrarano de senegala esperantista junularo.

ILEI-sekcio en Serbio ILEI-RS havas 5 membrojn kaj unu rajtigitan komitatanon. Sekciestro estas Aranka Laslo. Ili havas oficialan ret-adreson. Ili organizis A1 ret kurson kaj A1 retan kurson por nevidantoj. Someran ekzercigadon por komencintoj, retan, gvidis Živanko Novakov. A1 retan kurson gvidis Aranka Laslo kaj Jovan Zarković, A2 retan kurson gvidis Radojica Petrović. B retan kurson gvidis Zlatoje Martinov kaj Živanko Novakov.La sekcio aperis ĉe Zamenhofa-tago de SEL. Aliaj agadoj de la sekcio estas: ili partoprenis ĉe VEKI3, helpis en partopreno de retaj KER-ekzamenoj al 2 junulinoj. En JA aperis mikronovelo de Aranka Laslo „Veneciaj memoroj". Radojica Petrović prelegis rete pri „La interkultura turismo de Esperanto". En IPR aperis artikoloj :"Impresoj pri VEKI3", „Realaj spertoj en virtualaj eventoj", „Tibor Sekelj refoje inter esperantistoj, kaj aliaj raportoj pri agadoj de ILEI SR. Aperis ankaŭ nacilingvaj artikoloj ligitaj al la sekcio. Ĉiuj aperigitaj artikoloj estis rete dissenditaj al serbiaj esperantistoj, membroj de la Google-retlisto"Esperanto en Serbio.

Sveda sekcio de ILEI havas 11 membrojn. La sekciestro estas Sten Svenonius. La jarkunsido okazis pere de retpoŝto. Sep membroj partoprenis. Nenia agado okazis dum la jaro.

Svisa ILEI -Sekcio havas 15 membrojn. Unu komitatanon. En novembro 2022 la Komitato de ILEI nomumis Mireille Grosjean Honora membro de ILEI. Ŝi aperis en la kovrilpaĝo de IPRen la numero 2023/1.

En 2022 SIS Svisa ILEI Sekcio organizis seminarion en septembro. Mireille prelegis pri „Ĉu korekti?Kiel korekti?” ŝi lanĉis „Retan kunvenon kun Mirejo” kiu jam okazis sukcese du foje komence de 2023.

Ukraina IEI Sekcio havas 6 membrojn, unu komitatanon. La sekciestro estas Nina Danylyuk. En la Jaro 2022 en la sekcio laboris 12 personoj. Retaj kursoj okazis por komencantoj en 2021. Esperanto estis prezentita dum la studkursoj”Enkonduko al ĝenerala lingvistiko”kaj „Sociolingvistiko”en Lesja Ukrainka Volinia nacia universitato.En la sama universitato funkcias Esperanto en prelegoj kaj prezentaĵoj por studentoj kaj lernantoj. La instru-metodika lernolibro estis prezentita: „ Lesja Ukrainka en la mondo de la tradukoj”kun tradukoj al 12 eŭropaj kaj orientaj lingvoj, inter ili al Esperanto. Estis preparitaj materialoj por nova eldono de la poezio en Lesja Ukrainka al Esperanto. Ĝi ne estis eldonita pro la malsano de la membroj de la eldono kaj pro la milito.
Nina Danylyuk prelegis pri E- tradukoj en la internacia simpozio okaze de Memorialo de Lucija Borčić. Dum la virtuala UkrEA kongreso estis prezentitaj prelegoj pri KER-ekzamenoj, AMO -seminarioj kaj EKO.
Membroj de Ukraina sekcio partoprenis 55-an ILEI-Kongreson.
La studentoj de Lesja Ukrainka Universitato partoprenis en la retinario”Esperanto kaj turismo”kaj prezentis Ukrainion. La intervjuo kun Nina Danylyuk pri instruado de Esperanto”Ukrainio esperas”aperis en la revuo Juna Amiko nr2 2022.

IlEI Sekcio de Tanzanio havas 16 membrojn kaj 1 rajtigitan komitatanon. Sekciestro estas Mulele Mbassa Makaranga. Ili havas oficialan hejmpaĝon kaj ret-adreson. Propraj projektoj estis: lingvaj instruadoj, disvastigo de la Esperanto Movado kaj informado.
El Bunda urbo: Bunda Esperanto- Kulturcentro havas projekton lernigi interesiĝantojn de la lingvo Esperanto. El Mwaza urbo Viktoria Esperanto Klubo raportis pri trejnado de manlaboroj al la virinoj kaj stimulado por sia virina agado en Esperanto-rondo. Varbado okazas en la lokaj kluboj/grupoj. En Bunda urbo BEK okazigas Esperanto-kursojn kaj en Muleba urbo-MEC. En Kahanga urbo-K-do Hans Bakker Esperanto Pedagogio kaj Lerno Centro instruas Esperanton al infanoj. En Sengerema urbo, Shinyanga urbo, Tanga urbo kaj Bugoji vilaĝo oni okazigas kursojn. Ekde 2022 okazigas retkursojn en Tanzanio John Emmanuel Magessa kaj Kulele Mbassa Makaranga.

Togolanda ILEI-Sekcio havas 7 membrojn kaj unu rajtigitan komitatanon. Ili havas oficialan ret-adreson. Prezidanto estas Gbeoglo Koffi. Propraj aranĝoj estas: organizado de ILEI-ekzamenoj, kursoj en lernejoj. La kursoj okazas en Instituto Zamenhof por geinstruistoj kaj gelernantoj. Ili partoprenis en VAP (Verda Afrika Paradizo) kaj ACE-seminario, Zamenhoffesto 2022 kaj Togolanda ESperanto-Kongreso.

ILEI Zimbabvo havas12 membrojn, sekciestro estas Benjamin Kabwe Asende. En Chipinge sekcio okazis du kunvenoj de la instruistoj. Kunlabore kun la instruistino Francoise Noireau el Francujo kvin lernantoj, nunaj instruistoj, daŭre studas per vacapo. Tri studentoj el Hararo registris ĉe ZOOM kursaro. En lernejo okazas unu reta kurso.